Bulteno de

# BARCELONA STELO (Filio de B. E. S.)

Oficiala Organo de «Barcelona Esperantista Societo»

Jaro III.—Sup. de «Katalunа Esperantisto».—Jan.-Feb. 1914 —N^ro 1 (15)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 • Redaktoro : E. PELLICER

Barcelono vivu, kresku kaj floru. — L. L. Zamenhof

ENHAVO : *Grupaj aferoj.* — *Barcelona Esperantista Societo.*

## GRUPAJ AFEROJ

La 29^an de Januaro okazis ĝenerala kunveno de la grupo. En ĝi estis elektita la jena Komitato : *Prezidanto,* S-ro Josep Grau; *Vicprezidanto,* S-ro Esteve Rey; *Sekretario,* S-ro Pere Navas; *Vicsekretario,* S-ro Francesc Calzada; *Kalkulisto,* S-ro Joan B. Iduarte; *Kasisto,* S-ro Mariàn Pascuet; *Bibliotekisto,* F-ino Roseta Cortés; *Membroj* F-inoj Angela Leonor, Concepció Puig kaj S-roj Josep Carcereny, Pompili Tomás, Antoni Viñals kaj Estanislau Pellicer.

Oni elektis ankaŭ Propagandan Komitaton, kiu konsistas el S-roj Palmir Guillemot kaj Artur Domenech.

*Sciigo* : La parolado de S-ro C. Colas pri la kongresurbo de la X^a, kiun aranĝis nia grupo kaj «Semo» bedaŭrinde ne okazos ĉar familiaj aferoj malhelpas la distingindan samideanon S-ron Colas veni en nian urbon.

*Danko.* Ni ricevis de S-ro Benítez, kaj varme dankas lin pro tio, belan esperantan murkalendaron, reklamon de la konata Bazar Esperantista, kies mastro li estas.

*Edziĝoj.* Nia kunsocietano S-ro Ramón Pérez edziĝis la 25^an de Decembro kun la ĉarma fraŭlino Antonia Llacera.

Ankaŭ la 14^an de Februaro F-ino Rosa Simó, nia bela kungrupanino edziĝis kun S-ro Josep Solé. Al la feliĉaj paroj niajn bondezirojn.

*Vizito.* La 10^an de Februaro nia grupo havis la honoron gastigi la aŭstralian samideanon S-ron Maurice Hyde, el Melbourne, kiu per sia vervo pasigis al ni agrablan horon. Ni deziras al li feliĉan vojaĝon, dankas lin pro la vizito.

— Rondo de B. S-anoj okazigos serion de neoficialaj ekskursoj, kiu komenciĝis la 8an de Marto per vizito al la bela interesa ĝardeno kaj Labirinto posedaĵo de la Markizo de Alfarrás en Horta. La 25 kunekskursantoj bone amuziĝis kaj tre agrable pasigis la vesperon. Dum la reveno niaj samgrupaninoj efike propagandis en la tramveturiloj, disdonante propagandajn foliojn.

— Ni ricevis novaĵojn de niaj kamaradoj S-roj Delclós el Larache, Guixà el Madrid, Gili el Nicaragua, Dalmau el Bahía Blanca kaj Fritzsching el New York. Al ĉiuj ni deziras sukceson en iliaj entreprenoj.

*Ekskurso.* La Komitato de nia grupo interkonsente kun tiuj de «*Lumon*» (Terrassa) kaj *Esperanta Burĝono* (Rubí) organizis ekskurson al tiuj urboj kiu okazos la 12an de Aprilo.

*Ŝanĝo.* S-ro Josep Grau, elektita prezidanto de «B. S.», pro la pluaj laboroj kiujn la nova ofico havigos al li, lasas de tiu ĉi numero la direkton de tiu Bulteno. De nun ĝi estos redaktata de S-ro E. Pellicer; la legantoj malgajnas per tiu ĉi ŝanĝo; pro tio en la nomo de la nova redaktoro petas pardonon

KVANKAM

★ ★ ★

## BARCELONA ESPERANTISTA SOCIETO

La komencon de siaj taskoj por Esperanto konfidis la Komitato de B. E. S. al S-ro Fred. Pujulà, kiu faris la 13an de Januaro ĉe la Enciklopedia Ateneo agrablan spritan paroladon pri sia ĵusa vojaĝo tra Germanujo kaj vizito al Varsovio. Ni ne raportas longe, ĉar en KATALUNA ESPERANTISTO niaj amikoj trovos detalan priskribon pri la vojaĝo, kiun S-ro Pujulà humore rakontis, meritante la aplaŭdon de la multaj ĉeestantoj, inter kiuj ni vidis kelkajn el niaj pioniroj.

— Kun tiu ĉi numero estas disdonata programo de la festoj, kiujn la komitato de la B. E. S. organizis de post sia stariĝo en novembro lasta; ĝi konstatigos ke la Komitato efektive laboris, kaj ĝi certe stimulos ĉiujn samideanojn helpi per sia forto al la disvolviĝo de la nova organizaĵo, kiu portos plej bonajn fruktojn por Esperantismo, se ĝi ricevas la apogon kaj subtenon ĉies.

— *Nova Delegito.* La *Esperanta Racionala Grupo* estos de nun reprezentata en la «B. E. S.» de S-ro Josep Serrate.

## Bulteno de
# BARCELONA STELO (Filio de B. E. S.)

**Oficiala Organo de «Barcelona Esperantista Societo»**

Jaro III.—Sup. de «Kataluna Esperantisto».—Aprilo 1914 —Nro 3 (17)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 • Redaktoro : E. PELLICER

Barcelono vivu, kresku kaj floru. — L. L. Zamenhof

ENHAVO : *Grupaj aferoj. — Barcelona Esperantista Societo.*

## GRUPAJ AFEROJ

— Ekskurson al Font del Lleó en Pedralbes faris 30 el niaj gegrupanoj la 22.an de Marto. Kiel en ĉiuj aliaj, plej kora gajeco regis inter la ekskursantoj, kiuj revenis hejmen tre kontentaj je la agrabla posttagmezo kune pasigita. Fotografaĵoj, faritaj dum la ekskurso, estas aĉeteblaj en nia sidejo po 15 centimoj ĉiu.

— La prezidanto de la grupo *Frateco*, el Zaragoza, distinginda advokato, S-ro Benigno de Luna, volis favori per sia vizito nian grupon, kiu gastigis lin la 14an de Aprilo. Ankaŭ li partoprenis en la ekskurso al Terrassa kaj Rubi, kiun ni organizis, el kiu li ĉerpis fortojn por fondi la *Aragona Esperantista Federacio'n*, kiun certe baldaŭ ni povos saluti. Al la komplezema gasto plej koran dankon por liaj afablaĵoj.

## BARCELONA ESPERANTISTA SOCIETO

### Inaŭgura Festaro

En la sidejo de *«Ĉiam Antaŭen»* tre bele ornamita per girlandoj, flagoj esperantaj. k. t. p. kunvenis la 29an de Marto multaj esperantistoj por ĉeesti al la Konkurso de Legoarto, kiu havis lokon kun kontentiga sukceso. La feston komencis S-ro Grau per esperanta parolado pri la celo de la *Barcelona Esperantista Societo* kaj pri la sinteno rilate al ĝi de la ceteraj grupoj barcelonaj, kiujn li petis volu ekzameni la taskon de la B. E. S. kaj aliĝi al ĝi aŭ montri la aferojn, kiuj povas malpermesi tiun aliĝon. Li diris, ke al la devizo de la unua epoko de Esperanto : *espero, obstino, pacienco* kaj al la vorto *konkordo* por la dua epoko, la esperantistoj B. E. S.-anoj

devas aldoni la vorton *laboro*, ne nur por varbi novajn samideanojn, sed ankaŭ por reakiri la malnovajn laciĝintajn kaj tiujn, kiuj eble pro suspektemo kontraŭ personoj estas erarintaj. Fine li glosis iom pri la bonoj, kiujn unueco alportas al ĉiu agado kaj anoncis la komenciĝon de l' konkurso. Multaj aplaŭdoj.

En la konkurso de legoarto partoprenis fraŭlinoj Cortés, Leonor, Pascual kaj Rey, kaj sinjoroj Badia, Brossa, Graells, Guilleumot kaj Iduarte. La Juĝantaro konsistis el S-roj Pujulà, Grau, Pellicer kaj Amades, diplomitaj profesoroj de K. E. F. kaj Renom, Piñol kaj Claramunt, profesoroj ĉe la grupoj *Ĉiam Antaŭen*, *Supren* kaj *Esperanta Racionala*.

La konkursantoj ricevis, kvin minutojn antaŭ sia prezentado al publiko, tekston kvindeklinian el la Krestomatio kaj la belan versaĵon de S-ro Grabowski *La Tagiĝo*, kiujn ili legis antaŭ la ĉeestantoj kaj Juĝantaro. Ankaŭ ili legis versaĵojn laŭvole elektitajn, el kiuj ni aŭdis tre belajn, nome : «La blinda bovino», «Vi kial ne venas», «Amo», «Kanteto», k. c.

La juĝantaro post interkonsiliĝo publikigis la jenan verdikton:

Kvankam la prononcado de la esperantaj tekstoj estis tre korekta, precipe ĉe kelkaj konkursintoj, tamen la legomaniero, — de la vidipunktoj stila kaj emfaza, — de la partoprenintoj malpermesas la aljuĝon de la *unua* premio, kiu estas dividita en tri partojn (premioj 3.ª, 4.ª kaj 5.ª) — *Duan* premion, 10 pesetoj, la juĝantoj unuanime aljuĝas al F-ino Rosa Cortés; *trian*, 5 ptoj., al F-ino Angela Leonor; *kvaran*, 5 ptoj. al S-ro Palmiro Guilleumot; *kvinan*, 5 ptoj, al S-ro Antoni Graells; *reproduktaĵon de la statuo* «Venuso de Milo» al F-ino Enriqueta Pascual kaj *ekzempleron* de «La Naivulo» kiel subpremion al ceteraj konkursintoj, kiujn oni aplaŭdis, kiam ili ricevis la premiojn.

La finan paroladon faris S-ro Pujulà, kiu diris kelkajn ĝustajn vortojn pri danĝere erara agado de kelkaj samideanoj, kiuj intencas peti de la hispana Reĝo, ke la hispana ŝtato petu la aliajn por alpreno de Esperanto, kiel lingvo oficiala en la internaciaj diplomatiaj aferoj; la oratoro rimarkigis, ke eĉ kiam simila peto estus juĝata utila, prudento konsilas paralelan samcelan agadon internacian de ĉiuj esperantaj organizacioj por atingi senrapidecan kaj laŭvolan enkondukon de nia lingvo en ĉiujn sferojn de vivado. Por veni al tiu celo, li rekomendis konstantan propagandon, kiu diskonigos Esperanton kaj kreos favoran ĝeneralan opinion, fine sin trudontan al la registaroj. La oratoro estis longe aplaŭdata.

S-ro Renom, prezidanto de *Ĉ. A.* diris kelkajn dankajn vortojn kaj ĉiuj esperantistoj alestantaj kantis, forironte, nian himnon.

(*Daŭros.*)